


ELNA NEWSLETTER

NEWS OF THE LANGUAGE PROBLEM
AND ESPERANTO AS A SOLUTION

July-August 1984



69th UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO



INSIDE:

Photo Reports of Third Pacific
Lands, 32nd ELNA and
69th UEA Conventions, Portland
and Vancouver

UNISPACE 1985 – International
Year of Youth

Introducing ELNA's New President

"...increased economic interdependence...is our great hope for peace. If we get sufficiently interlaced economically, we will most probably *not* bomb each other off the face of the planet."

– John Naisbitt, *Megatrends* (page 79) - SEE INSIDE



Prof. Duncan Charters
ELNA's New President 1984-1987

ELNA ELECTION RESULTS:

President: Prof. Duncan Charters, Foreign Language Department, Principia College, Elsau IL
 Vice President: Ken Thomson, Pasadena TX
 Board Members: Dr. James F. Cool, Wilmington (OH) College;
 William R. Harmon, Vice President, Matson Navigation Co. Inc., San Francisco CA
 David T. Wolff, Boston MA, Chairman of 1985 ELNA Convention



ŜI TION JA MERITAS!

Dum la ĉijara kongreso, ELNA nomis Dorothy Holland Honora Membro de ELNA. Ekde 1946 kiam ŝi lernis Esperanton, ŝi komencis vastan mondkorespondon kaj instruis la internacian lingvon. En 1948, ŝi estis unu el la fondintoj de la nuna Esperanto-Societo de Chicago. Ŝi verkis radiokurson por Stacio WSEL. En 1955 ŝi ĉeestis kun edzo Roy sian unuan Universalan Kongreson en Bolonjo, Italio. Post tio ŝi partoprenis kongresojn en Harrogate, Rejkjavik, Lucerno, Brazilio, Budapeŝto kaj Vankuvero. Krom tio ŝi vizitis plumamikojn de Kanariaj Insuloj ĝis Skandinavio.

Sed eble ŝia plej alte taksata kontribuo al la Esperanto-movado estas kiel instruisto, eĉ per brajla koresponda instruado de Esperanto por Hadley School for the Blind (Winnetka IL), kaj kiel administranto de la ELNA-Koresponda Kurso. Simile, ŝi administras la 3-nivelan nacian ekzamenon. Instruistoj-membroj de AATE (American Association of Teachers of Esperanto) konas ŝin pli intime per la paĝoj de ties valorega kvaronjara *Bulteno*.

Skribas Dorothy: "Mi ne povas imagi mian vivon sen Esperanto..."

NOTE: The Santa Barbara News Press (8/15) carried an item describing Dorothy Holland's contribution to the teaching of Esperanto and the fact that she has been named Honorary Member of ELNA.

**YOUNG UNISPACE/WORLD SIMULATION 2001
 A Program for 1985, International Year of Youth**

[The following article reports on UNISPACE, a microcomputer educational system which simulates international communication and trains youth to analyze problems and make decisions. The system will deal with various matters of the modern world regarding economics, international relations and space navigation. One goal of the program is to simulate the problems of multilingualism and translation – which is where Esperanto enters the picture.]

– Amri Wandel, Ph.D., Univ. of Maryland

La iniciato celas al aplikado de Esperanto en la projekto UNISPACE (ligita al la Internacia Jaro de Junularo [IJJ] de UN) kaj al perkomputila instruado de Esperanto al gejunuloj internacie. Se ĝi sukcesos, povas rezulti giganta progreso en la maŝina aplikado, instruado kaj disvastigo de Esperanto.

La kontakto kun la projekto UNISPACE okazis kadre de la UN-Komisiono de Ne-registaraj Organizoj (NRO) pri Junularo.

Kiel tiu projekto rilatas Esperanton? La iniciatintoj

ekinteresiĝis pri utiligo de Esperanto en la jenaj aspektoj de la projekto:

- (a) Unu el la instru-programoj estu perkomputila lernado de Esperanto.
- (b) La gejunuloj uzantaj la sistemon disponu pri "libera tempo" dum kiu ili povos komuniki kun aliaj centroj; la komunikado eblos nur per Esperanto, kiu instigos ilin mem uzi la instruprogramon.
- (c) Dum la komenca etapo de la internaciaj centroj (oni taksas ke estu centroj en ĉirkaŭ dek landoj en kvar kontinentoj) oni uzos la gvidon kaj instigon de lokaj esperantistoj pri la Esperanta parto.

La iniciatintoj interesiĝas pri ĉiuspecaj spertoj kaj provoj de programita instruado de Esperanto, kaj uzo de Esperanto en komputiloj. Se vi konas personojn kiuj havas tiajn spertojn, aŭ kiuj eventuale interesiĝas pri la projekto aŭ povos iel kontribui, bonvenu sendi al ili tiun ĉi informon. Kiel kontakti la projekton? Por pluaj informoj, por krei rektan kontakton kaj por sendi sugestojn, materialon kaj aliajn kontribuojn, oni skribu al: D-ro Amri Wandel, Dept. of Physics and Astronomy, University of Maryland, College Park MD 20742.

KINO – RECENZO

NOTE: The following is from a review of the film *The Day After* by Amri Wandel, Ph.D. (Astrophysics), a postdoctoral fellow at University of Maryland and past president of TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo)

LA TAGO POSTE, ĈU EVITEBLA?

Kiel aspektos nia vivo post nuklea atako? Tiun demandon provis respondi la ŝoka filmo *The Day After* (*La Tago Poste*), elsendita de la usona televida reto ABC en novembro 1983, altirante rekordan nombron de pli ol cent milionoj da spektantoj.

La Tago Poste estas la historio de usona urbeto en Kansas, kiu travivas nuklean bombadon...

Post la filmo, grupo da specialistoj analizis la politikajn, sciencajn kaj humanismajn aspektojn de la nuklea minaco. Inter la specialistoj estis la antaŭa kaj nuna ministroj pri eksteraj aferoj de Usono, Henry Kissinger kaj George Schulz; la konata sciencisto Carl Sagan; kaj la holokaŭsta verkisto Eli Visel.

Unu el la plej evidentaj demandoj prezentitaj al la specialistoj estis, "Ĉu tia surscenigaĵo estas realisma, kaj ĉu ĝi vere povas okazi?" D-ro Sagan emfazis ke la filmo subtaksis la rezultojn de grandskala nuklea milito...

"...Laŭ mi la plej grava aspekto ne estas la politika. Temas pri la pluekzisto de la homa civilizacio. Siatempo oni demandis al Einstein kiajn armilojn oni uzos en la estonta milito. "Mi ne scias kion oni uzos en la venonta milito", respondis Einstein, "sed la postan militon oni batalos per ŝtonoj kaj bastonoj".

La demando estas, ĉu rezono venkos antaŭ ol estos tro malfrue? (el *Kontakto* 1984-3)

LA SUNO NENIAM SUBIRAS EN ESPERANTUJO

Raporto pri la Tria Tut-Pacifika Konferenco

Partoprenis la Tut-Pacifikan Kongreson en Portland 14-19 julion proks. 150 kongresanoj el 12 landoj: Aŭstralio, Ĉinio, Hispanio, Irano, Japanio, Kanado, Kolombio, Koreujo, Meksikio, Nederlando, Novzelando, kaj Usono.

En sia festparolado ĉe la malfermo, Aŭstralio Ambasadoro em. Hon. Ralph Harry demandis: "Kiu estas la trajtoj de internacia komunumo? Kie trovi modelojn?" Unu fonto bone konata al li estas la brita regnokomunumo. Tie oni trovas etikan bazon, jur-sistemon, naciajn ludojn, ekonomion, turismon, kulturajn valorojn, komunan lingvon. Ekzistas tiaj similecoj aplikeblaj al la Tut-Pacifika Esperanto-komunumo.

Salutantoj el la 12 landoj liveris mesaĝojn de bonvolo. S-ro Ĉen, vicprezidanto de Ĉina Esperanto-Asocio, faris spritan kaj varman inviton al la 71a Universala Kongreso en Beijing, Ĉinio en 1986. Simile Ambasadoro Harry menciis inviton de la 73a UK al Brisbane, Aŭstralio en 1988.

Ĉe la fermo, oni anoncis ke raporto pri la 3a Tut-Pacifika Kongreso estos sendita al la UN. S-ro Harry rekomendis interŝanĝon de informoj flanke de instruistoj de Esperanto en la Pacifikaj landoj. Tiel tiu ĉi grupo de Pacifikaj Esperantistoj faros la unuajn paŝojn al valora kunlaborado.

GRAVA ANONCO: NOVA POSTENO ĈE LA CENTRA OFICEJO DE ELNA

Kiel vi verŝajne jam scias, la laboro en la Centra Oficejo grande kreskis dum la lastaj du jaroj. Pli kaj pli evidentiĝas, ke ELNA nepre devas dungi alian homon. Se vi interesiĝas pri la ebleco labori en la centro de la usona movado, bonvolu skribi Esperante pri viaj talentoj kaj laborspertoj kiel eble plej baldaŭ.

ELNA bezonas personon kiu pretas labori diligente sub la gvido de la Direktoro kaj povos resti ĉe la posteno almenaŭ unu jaron. Spertoj pri librotenado, oficejaj maŝinoj, kaj komputiloj aparte gravas. Posedo de aŭto prefera sed ne nepre necesa. La posteno postulas loĝadon en la San Francisco regiono.

Interesatoj skribu kun personaj detaloj al: Gregory Wasson, 246 Water St., Point Richmond CA 94801.



-1-



-2-



-3-



-4-



-5-




-6-



-7-



-8-



-9-



-10-




-11-



-12-




-13-



-14-



-15-




-16-



-17-



-18-



-19-



-20-



-21-



-22-



-23-

KONGRESA FOTO-ALBUMO DE 69a U.K.



-24-



-25-



-26-



-27-

- 1 Ruth Culbert, Prof. Sidney Culbert kaj Mary Hammersmith (Washington state)
- 2 YANG Kaiyuan, Ĉina vojaĝagento; ZOU Guoxiang, redaktoro de *El Popola Ĉinio*; DAI Songen, ĈEL; Diccon Masterman, KKS de UEA; D-ro CHEN Yuan, VP de ĈEL; W. Du Temple, LKK; ZHANG Qicheng, Ĝen.Dir., ĈEL; XUE Meixian, Radio Pekino; ZHU Mingyi, ĈEL.
- 3 Merle Haltrecht-Matte, Toronto; Jane Sloan, Vankuvero; Martin Parlan, San Francisco
- 4 Wm. R. Harmon, UEA Ĉefdelegito, Usono; F-ino Kitabatake, Sapporo Japanio
- 5 Katherine Brent, Skotlando
- 6 Anne Whittaker, gazetara servo, LKK; Olga Du Temple, LKK
- 7 Alex kaj Edith Philip, Victoria
- 8 Infanan Kongreseton reprezentas denaskaj Esperantistoj Du Temple, Jones, kaj Murphy
- 9 Gregoire Maertens, Prez. de UEA; Folio KIM, Koreujo
- 10 Prof-o Duncan Charters ekzamenas Derek Roff pri SFSU-kurso dum Tago de la Lernejo-konferenco
- 11 Reprezentas Brazilon Giuseppe kaj Ursula Grattapaglia de Bona Espero
- 12 Japanan kaj Korean kostumojn portas F-ino Kitabatake kaj S-ino A. Chaesun Jones
- 13 Michael DeLory, Halifax; Gary Norris, Vankuvero
- 14 Prof-o Robert Blair de Brigham Young Universitato instruas per sugestopedio bazan lecionon dum Tago de la Lernejo
- 15 Jonathan Pool; Susan Dwyer-Schick; D-ro Ewik de EEC. Prof-o Pool prelegis en la Kongresa Universitato
- 16 D-ro Maxwell Yalden, Ministro pri Oficialaj Lingvoj, gastprelegis pri Kanada Lingvo-politiko kaj la monda lingva problemo ĉe la solena malfermo. Lin prezentis D-ro John Wells
- 17 Charles Power, Usono kaj D-rino Daniela Deneva, sismologo el Bulgario kiu prelegis en la Kongresa Universitato pri Prognozado de Tertremoj
- 18 D-ro Humphrey Tonkin, Prez-o, N.Y. State Univ., Potsdam; Jane Tonkin; Gonzalo Bermúdez, Kolombio
- 19 Mark Fettes deklamas ĉe la Kanada Art-vespero
- 20 Korspiro-Kantgrupo (Usona), ĉe Internacia Artvespero
- 21 Yoshimi Umeda, VP de UEA, prezentis artistojn dum la Internacia Artvespero
- 22 Alberta Casey, Usona kantistino, ĉe la Artvespero
- 23 "Break"-dancisto ĉe Internacia Artvespero
- 24 Muzikistoj regalis ĉe la Internacia Artvespero
- 25 Brita Kolumbia Indiano dancis ĉe la Kanada Vespero
- 26 Martin Parlan kaj Doris Vallon-Wheeler trovis bonan Japanan restoracion por MAEDA Sigeki de Toyota-si, Japanio
- 27 W. Du Temple transdonas la kongresan flagon al S-ino Elsbeth Bormann kun bondeziroj por sukceso de la 70a UK en Augsburg, Germanio 1985



-1-




-2-




-3-



-4-




-5-




-6-



-7-



-8-



-9-



-10-

FOTO-ALBUMO DE LA PORTLAND-KONGRESO


- 1 Lusi Harmon, Esperanto Travel Service, escorts convention caravan at San Francisco Airport. L-R: Dr. Chen, China; Lusi Harmon; Prenda Cook, Texas; Lorraine Burtzloff, San Francisco
- 2 Marge McGowan, Chris & Jo Warnken are off to Portland
- 3 Sharon Lakosky and Mary Napolitan, Michigan
- 4 Bill Harmon with Chinese delegates CHEN Yuan, DAI Songen, ZHANG Qicheng and ZOU Guoxiang
- 5 At Portland University, Evelyn Deer and Virginia Stewart register Rochelle Grossmann of New York
- 6 Mrs. Maloud Saghafian, Iran; Vilma Eichholz, Canada shows a polyglot display to Gonzalo Bermúdez of Colombia as Rüdiger Eichholz looks on
- 7 Prof. ZHOU Huanchang, Beijing; Miss Kitabatake, Sapporo, Japan; Ada Fighiera-Sikorska, Madrid; and the Stewart children at the World View Day Celebration
- 8 HAN Moo-hyup, publisher of Korean Esperanto review ESPERO; Margaret Barkley, UEA Delegate San Francisco; MA Young-tae, Korea
- 9 Prof. Ronald Glossop, So. Illinois Univ.-E; William Glenny, UEA Delegate Beverly Hills CA; Mrs. Glossop
- 10 David L. Trautmann, Gallup NM; Ellen Eddy, UEA Delegate Richland WA
- 11 Australian Ambassador, Em., Hon. Ralph Harry, gives the keynote address at the 3rd Pacific Lands Esperanto Convention
- 12 Welcome sign at entrance, Portland University
- 13 Yoshimi Umeda, Tokyo, Vice President of UEA, greets the Pacific Lands Convention
- 14 Dr. Wm. Dickerman, Houston; Prof. James Cool, ELNA Board member
- 15 Amb. Ralph Harry finds a quiet moment to chat with Ada Fighiera-Sikorska, editor of *Heroldo de Esperanto*
- 16 John Massey, ELNA Treasurer; Ellie Stein, San Diego
- 17 Dr. John Schilke, Pres., Portland Esperanto Society, receives a gift from Miss Kitabatake on behalf of Portland's Sister City Esperanto Society in Sapporo, Japan
- 18 Mary-Ann, daughter of the Conn Murrays, ZHU Mingyi, Beijing, and Mary Murray renew their friendship. Mr. Zhu slept on 3 chairs outside Mary's hospital room when Mary was stricken with a heart attack at Nanjing 3 years ago while on an Esperantist excursion to China.
- 19 Bettie Hart, Australia, with Prof. Zhou at the ELNA Ball
- 20 Noriko Mati, Hotimi Kitabatake, Japan; and Messrs. Yang and Zou, China
- 21 Mr. Zhu with Mary & Conn Murray of Gresham OR
- 22 Bill and Cathy Schulze at the ELNA Ball
- 23 Su Jones, Chicago with Nagayuki Kasai of Tokyo disco-dancing
- 24 Lusi Harmon and Martin Parlan, California, having a Ball



-11-




-12-



-13-




-14-



-15-




-16-



-17-




-18-



-19-



-20-



-21-



-22-



-23-

-24-

RECENZO

ESPERANTO/EDZPERANTO

Internacia geedziĝo - Esperanta Virina Asocio, \$5.95

Enketo pri 66 internaciaj geedzoj esperantistaj. La libro traktas respondojn de 66 geedzoj el 18 landoj. Ĉapitro PRI ĜENERALAJ PROBLEMOJ; I "De konatiĝo ĝis geedziĝo, obstakoj, ktp.;" II Ĉoj kaj suferoj en la vivo; III Loĝlando; IV Okupo (profesioj); V Nacianeco.

Ĉapitro PRI LA LINGVAJ PROBLEMOJ; Uzlingvoj antaŭ kaj post geedziĝo; Lingvoj inter gepatroj kaj infanoj; Poliglota infanoj; Kiam uzi Esperanton?, ktp.

La libro aĉetindas nur por legi la belan manuskripton de S-ino Iŝtok-Momoki Saĉiko (japan-hungara paro loĝanta en Kanado) kiun mi citas nur parte:

"Niaj infanoj neniam havas malfacilaĵon pro ke ili estas mikrasaj...sed ĉar ilia patrino estas orientano..." Pri la fileto ŝi skribis: "Iu tage li diris al mi, ke li ne ŝatas esti Japano. Eĉ li volis ĉesi esti Japano. Estis malfacile komprenigi al tiu bebema filo ke tian aferon oni ne povas ŝanĝi nek ĉesi. Mi diris al li, 'Vi estas Kanadano. Via patro estas Hungaro kaj via patrino estas Japanino, do vi estas duone Hungara, duone Japana, sed en tuto vi estas Kanadano same kiel aliaj geknaboj en via lernejo. Kaj tio estas tio!'"

"Kaj mi aldonis, 'Ĉar tio estas la Deziro-de-Dio, vi devas akcepti la fakton.' Malkontente li silentis kapesante.

"Li ripetis saman procedon plurfoje. Nun je la 2a grado, li ne plu plendas kun kordoloro kiel antaŭe, sed kompreneble kun iom da kolero. 'Deziro-de-Dio' estas la magia vorto, ĉar niaj infanoj iras [tiel] la katolikan lernejon. Dio ĉiam havas la lastan vorton."

S-ino Iŝtok parolas ankaŭ pri spertoj kun la filinetoj. Plue ŝi parolas pri la problemo de rasismo ĝenerale. Ŝi deĵoras kiel gvidistino por Japanaj turistoj kaj atestas pri rasismo kiun ŝi rimarkis iliaflanke.

Kortuŝaj estas la manuskriptoj de la diversaj geedzoj kiuj respondis kaj samtempe belaj la deklaroj de amo kaj respekto en familioj kunligitaj pere de Esperanto.

— Recenzita far Cathy Schulze pro iniciato de Hirose Kanae, Yokohama, unu el la esploristoj

NOTE: This book, *International Marriages*, compiled by the Esperanto Women's Association (EVA) in Japan, despite the obligatory statistics is a moving human document. There appears to be a feeling in these Esperantist families that they are part of a bigger world, a fact not often true in the average family.

Mikronoveloj de Sin'iti Hosi. Tradukis Kikunobu Matuba. Libroteko-Tokio, 1983. broŝurita, 76p. \$7.35.

Antaŭnelonge atingis la Centran Oficejon nova libro el Japanio: *Mikronoveloj de Sin'iti Hosi* en traduko far Kikunobu Matuba. Laŭ la postparolo, la verkojn de Sin'iti Hosi (nask. 1926) japanaj Esperantistoj ofte uzas en kursoj por lingva-traduka ekzercado. Traleginte la Esperantan version, oni povas tuj konstati la kialon: la verkaro de Sin'iti Hosi

konsistas el mallongaj pecoj, plejparte nur 1-3 paĝaj, ĉiuj verkitaj en klara, simpla stilo. Ĉi tiu kolekto enhavas 14 novelojn (aŭ "mikronovelojn" laŭ la titolo). Ĉiun novelon markas la sama frape, sed freŝige akra sinteno rilate la homan vivon – vivo kiu ofte surprizas nin, eĉ, kiel en la plejparto de ĉi tiuj noveloj, dum ĉiutagaj okazaĵoj en la vivoj de ordinaraj homoj.

La elnodiĝo de ĉiu novelo estas surprize – taktiko kiu rememorigos almenaŭ kelkajn el vi pri la stilo de O'Henry. Aliaj, kiel mi (bubo de la televida epoko), sendube komparus la novelojn al la epizodoj de la fama televida programo, *The Twilight Zone*.

La grafika aspekto de la libro impresas kaj preseraroj estas malmultaj. Entute, bona libro kies facila stilo kaj nekutima enhavo kaj legigos komencantojn kaj distros eĉ la korojn pli mondlacajn. Jen ege frandinda aldono al ĉies libroŝranko.

— Gregory V. Wasson

Tófalvi, Éva, & Kníchal, Oldřich: *Kiuj Semas Plorante...* Universala Esperanto-Asocio, 1984. 102p. \$6.35 ĉe ELNA Libro servo.

Prenante ĉi tiun libron en mia mano, mi konis Évan Tófalvi nur 'pere de ŝia leginda, bone elpensita eseo "La Rolo de la Persona Faktoro en la Esperanta Literaturo" (Premio Minnaja 1981 – aperis en *Fonto* #15). Ŝian edzon Oldřich Kníchal mi konis nur per kelkaj nememorindaj noveletoj, kiuj fojfoje aperas en *Fonto* (aŭ ĉu, dirante tion, mi eble montras ŝaluzeton, kiun mi sentas, vidinte la unue nomitan verkinton, belan feinton en trikolora pulovero, sur la kovrilo de *Fonto* #28?). Ankaŭ mi scias, ke ili kunlabore verkis premiitan romanon *Kiuj Semas Plorante...* Ĉu vere temis pri valora romano? Aŭ pri nura fanfaronado?

Leginte la libron, mi nepre subtenas la decidon de la juĝintoj pri la Schwartz-Premio; temas pri verko, bedaŭrinde mallonga, kiu absolute ne devus honti antaŭ similspecaj romanoj en la nacilingvaj literaturoj. Nur pri unu afero mi devus malkonsenti kun ili. En mallonga antaŭparolo la eldoninto atribuas al ili la sugeston, ke "la aŭtoroj montras, kiel homo povas erarigi sub influo de politika ideologio". Pri tio ŝajnas al mi, ke eble la juĝintoj mem eraravagas.

La jaro estas 1938. En sanatorio troviĝas la protagonisto, Stefano Bende, suferante pro iu nedefinita mensa malsano. Bende volas eskapi de la sanatorio kaj fuĝi al iu fora lando, eble Usono. Paŝon post paŝo li klarigas la kialojn de tio, rivelante al la leganto la historion de sia vivo. Evidentiĝas, ke la mensa malsano suferata de li estas egoismo – pli precize, se mi rajtas neologismi, *anempatio* – nekapablo kompreni la pensojn kaj emociojn de aliaj homoj, ĝis grado preskaŭ nekredbla. Lian tutan vivon terure difektis tiu mensa kripoleco.

Influate de sia malsano, la studento Bende turnas sin al la faŝisma movado en sia (neniam nomita) lando, ĉar ĝuste la faŝismo en tiu medio allogas la homojn, por kiuj plej gravas la memo. Li fariĝas malgrava (tion li neniam bone komprenas) spiono por la faŝiste-enfiltrita sekureca polico de la lando, same kiel en Usono li fariĝus meznivela "jesanto" en iu korporacio, aŭ en Sovetunio li fariĝus negrava aparatano. Oni komisiis lin aliĝi al kaj subfosi malgravan sed eble danĝeran internacian konspiron – la esperantistoj. Do li lernas Esperanton kaj aliĝas al la duonsekrete Esperanto-grupo "Konkordo". Mi ne priskribos la rezultojn de tiu spiona agado, sed por ĉiu komprenanto de la animo de Stefano Bende, ili ja devus esti evidentaj, ĉar neeviteblaj.

Ĝuste pro la karaktero de Bende mi malkonsentas kun la konkludo proponita en la antaŭparolo. Bende ne eraravagas sub influo de faŝismo; li fariĝas faŝisto ĉar li estas "eravagema". Lia faŝistiĝo mem estas kvazaŭ misfaro, kaj li akceptas tion ne pro ia profunda kredo je la fundamento de la faŝismo, sed por la personaj avantaĝoj, kiujn tio portos al li. Ĉiu decido, ĉiu faro en lia vivo baziĝas sur respondo al la demando: Kio plej helpos min? Tio evidentiĝas en liaj decidoj ĉu helpi, ĉu ne helpi...ĉu denunci, ĉu ne denunci.

(Daŭrigata sur paĝo 9)

(Kiu Semas Plorante, daŭrigo)

Ekzemple, jene:

“—Kaj se oni ne ordonos, sed persekutos min? —demandis Wolf. [psikiatro en la sanatorio]

“—Vin?! Ja vi ne politikumas. [Katarina, flegistino, lia amatino]

“—Pro mia juda deveno...”

“—Tiam mi kaŝvagados kun vi. Sed kiu povus entute supozi ion similan en la civilizita Eŭropo?

“Mi ekstaris kaj fermis la fenestron. Stulta, naiva kvabino! Mi devus diri al vi: Konvinku vian fianĉon urĝe veturi eksterlanden, al Ameriko, Aŭstralio, tute egale kien, nur kiel eble plej malproksimen.

“Sed mi ne atentigos ilin. Mi devas persisti en mia malsano. Mi devas ludi ĝis troviĝos pli bona ebleco.”

—paĝoj 7-8

Aŭ jene:

“Hejme mi meditis, ĉu lasi tiun mizeran diablon en la paco kaj anonci, ke li eksiĝis de la [Esperanto-] kurso, aŭ... Se al Pander estis malmulte tri, tiam li sendube volas instigi min, la komencanton, al pli verva laboro. “Du tagojn mi cerbumis, ĉu komuniki la kazon pri Herzfeld. Dum tiam mi plurfoje ekiris al telefona tableto, sed ĝuste tiomfoje haltis. Ĉu mi kompatis lin? Ne, simple mi trovis la aferon sensignifa. La majoro povus koleri, se mi ĝenus lin per tiaj bagatelaĵoj. Ja ĉu li ne atendas de mi iun grandan fiŝon? Poste tamen...Unuafoje mi uzis mian specialan telefonon.”

—paĝo 72

Kiel vi rimarkas, la romanon oni verkis laŭ unuapersona rakontmaniero. Tiel ni bone konatiĝas kun la malŝatinda persono de Stefano Bende. Aliaj rolantoj estas kartonaj. Generale tio estas difekto en fikcio; sed ĉifoje ĝi estas double pravigebla. Unue, la plimulto da rolantoj estas movadanoj, kaj la leganto-Esperantisto facile rekonos ilin sen multe da detaloj. Ekzemploj estas la filozofo Varda, ĉefapogilo de la tiea movado; Lazaro Orban, la fajra aktivulo; kaj fraŭlino Hamor, la seka mezaĝa tajpistino. Due, ĉar ni vidas ĉiujn aliajn personojn tra la okuloj de Stefano Bende, kaj por homo kiel Bende ili ne povas esti aliaj ol kartonaj, tiu magreco de karaktero estas absolute neevitebla. Eble malfeliĉe, pro tio ni ankaŭ ne povas eĉ malŝati la faŝistajn rolantojn, de la itala profesoro Tettamanti, kiu iniciatas Bende en la partion, ĝis la poliestro Pander. Same kiel la esperantistoj, ili estas kvazaŭ fantomoj, kies sola ekzistocelo estas apogi la egoon kaj sukcesojn de Bende. Tiel li vidas ilin, tiel ni devas vidi ilin.

Pri Tófalvi oni skribis en *Fonto*: “Ŝia celo estas verki tiajn beletraĵojn—precipe romanojn—kiuj plifortigas en la esperantistoj ilian konscion pri la movada aparteno. Tiu stimulis sin iniciati tezon pri la ‘memkoniga romano’...” Tion oni povas vidi en subfadeno de la traktata romano: la laŭgrada disfalo de la Esperanto-movado sub la premo de faŝismo en la mezeŭropaj landoj dum la tridekaj jaroj. Kvankam ni diras al ni, ke ni tiel firme kredas je la “interna ideo”, ke ni neniam rezignos pri ĝi, ni tamen rajtas iomete dubi pri tio, aŭdante tra la oreloj de Bende la sugeston de f-ino Hamor, ke oni alktimiĝu al la nova realeco, elpelante ĉiujn judojn el la landa Esperantista Ligo—fikcia afero kiu tamen reflektas eventon, kiu vere okazis en tiutempa Germanujo—eventon aliloke aluditan en la romano.

La lingvaĵo estas preskaŭ modela, tamen nekomplika. Nur unu eventualan malgataĵon mi rimarkis—“anstataŭ ĉe marbordo”. Povas esti aliaj, sed mi trovis la romanon tiel interesa, ke mi ne rimarkis ilin.

Entute mi senhezite rekomendas ĉi tiun romanon al ĉiu leganto.

Modest, Julian: *La Ora Pozidono*. Hungara Esperanto-Asocio, 1984. 64p. \$4.00 ĉe ELNA Libroservo.

En la 30aj jaroj evoluis en Budapeŝto la t.n. “Budapeŝta Skolo” de Esperanta poezio ĉirkaŭ la revuo *Literatura Mondo*. En la 80aj jaroj formiĝas nova “Budapeŝta Skolo”, ĉifoje proza, ĉirkaŭ la eldona kampanjo de la Hungara Esperanto-Asocio. Unu membro de tiu skolo, transplantita juna bulgaro, ĉi tie reprezentiga en la HEA eldonagado per romaneto, kiu plej bone priskribblas per la adjektiva formo de lia plumnomo—modesta.

Temas pri okazaĵo en la postabiturientiga somerferio de juna bulgaro—renkontiĝo kun esperantista triopo en apudmara ripozadejo. La grupon konsistigas bulgara kuracisto, lia edzino, kaj ilia eksterlanda gasto, juna franca samideano, kun kiu la rekontanto enamiĝas. Sed aferoj ne estas tiel simplaj, kiel la sensperta knabo komence supozas, kaj la somerferio abrupte kaj tragedie finiĝas okaze de la Festo de Pozidono.

La intrigo de la romaneto estas sufiĉe simple—knabo enamiĝas, knabo elamiĝas. Temas pri nura evento en la vivo de la junulo; se ĝi helpis maturigi lin, tio ne evidentiĝas el la romaneto. Efektive mi sentis nenian simpatian kun tiu juna rakontanto, nek kun la franca knabino, kiu ŝajnis al mi aparte sensuka. Aliflanke, mi mem povus enamiĝi kun la bela sed suferanta juna edzino Klara, kies edzo traktas ŝin je pluraj senpensaj kaj sensencaj kruelaĵetoj. Ankaŭ la edzon, aristokratecan kaj arogan, Modest bone karakterizas. Interese estas, ke la edzo estas en la grupo la plej fervora esperantisto (la juna bulgaro kaj la franca knabino lernis la lingvon en lernejo; al la edzino la edzo trudis la lingvon per aparte interesa ruzo). Se lin skizus kontraŭesperantisto, oni preferu nomus lin karikaturato; sed sub la plumo de Modest, kiu foje montras vere bonan priskribivon, li fariĝas persono, kiun la esperantista leganto povas samtempe ŝati kaj malŝati (vidu paĝojn 40-42).

La lingvaĵo de la libro estas facila, stile klara. Mankas glosaro; sed, kun nur unu-du esceptoj, mankas radikoj netroveblaj en PIV. Kelkaj legantoj povus plendi, ke en siaj priskriboj Modest tro ofte uzas “neologismojn”; sed ĝenerale temas efektive pri neoficialaj vortoj inventitaj jam far Zamenhof kaj/aŭ Kalocsay antaŭ pli ol duona jarcento.

Ekzistas kelkaj gramatikaj problemoj ne atribueblaj al la preskoboldo. Mi mencias tri: manko de akuzativo post *kiel* (“mirakla forto kiel plumo levis min”, “mian ĝentilan, sed subitan geston, Adele akceptis kiel trafa ŝerco”); ĉiama uzado de adjektivo post “aspektas” (vidu paĝon 74 de PIV); uzado de “kredi en” anstataŭ “kredi al” aŭ “kredi pri”. Laŭ mi unu eraro stila, ne gramatika, estas troa uzo de “ĉi” en “tiu ĉi”, “tie ĉi”, kiun mi trovis aparte ĝene en la komencaj ĉapitroj.

Jen leĝera legaĵo por mallonga vespero. Se oni ne atendas multon de ĝi, oni facile povos ĝui ĝin.

LOCAL NEWS

UTAH – Charles Hall of Salt Lake City arranged a successful tour during July for Ada Fighiera-Sikorska, editor of *Heroldo de Esperanto*, an Esperanto newspaper read on all continents. She was interviewed by newspapers, radio and television in Logan, Provo, and Salt Lake City.

Mormon Filmstrip in Esperanto. The Church of Jesus Christ of Latter-day Saints offers its popular film "Man's Search for Happiness" dealing with the purpose of life and related philosophical questions explained from the standpoint of Mormon theology. The filmstrip and cassette are FREE. Order No. VVOFo348ES from The Salt Lake Distribution Center, 1999 West 1700 South, Salt Lake City UT 84104.

CALIFORNIA – ELNA member Ronald Glossop, Ph.D., So. Illinois University and the author of *Confronting War*, was one of a panel of experts at the day-long Global Security Conference in San Francisco July 14th. Dr. Glossop's book is a good source for any discussion of global security.

The book's chapter headings include: Introduction to the War Problem; Causes of War; The Contemporary Situation; Proposals for Solving the War Problem. Of special interest to Esperantists is Dr. Glossop's advocacy of Esperanto as a suitable response to the need for a second common language to facilitate global communication.

In a note to the reader, Dr. Glossop concludes: "In general people have not put much of their time or money into the struggle to eliminate war. Their efforts have been directed instead to getting more for themselves, regardless of what that might mean for others...perhaps someday people will change their ways; but then, again, probably they won't... The disturbing thought comes to mind again and again that people are likely to get just what they deserve."

To order *Confronting War*, 304p., send \$19.95 plus \$1.50 shipping to: McFarland & Company, Inc., Box 611, Jefferson NC 28640 or to Dr. Glossop.

ILLINOIS – **Chicago:** Museum curator, world traveler, and author of Esperanto fiction and fact, Tibor Sekelj of Jugoslavia held a Chicago audience spellbound as he recalled his contacts with some of the world's more exotic peoples. Using slides and speaking in elegant Esperanto, Sekelj was one of the Chicago Esperanto Society's most fascinating guests at the June meeting.

(reported by Jamie Laux)

Pac-Promeno en Chicago okaze de Patrino Tago en majo. Kelkaj Chicago-klubanoj partoprenis: Tony Gray, Tina Seastrom, kaj Jamie Laux. Kent kaj Kim Jones kaj Tony Gravagno okupiĝis ĉe tablo disdonante informilojn.

Press Publications, Chicago 6/27: Staffer Preston Pisellini headlined a lengthy article about visiting Esperantist Tibor Sekelj with "Traveler Breaks Language Barriers."

OREGON – Mondvida Tago, 17a junio, ĉe West Hills Unitarian Fellowship, Portland ĝuis programon gvidita far Jim Deer de la Esperanto-Societo de Portland.

ANONCOJ

ALBERTA CASEY SINGS! If you liked her LP *Al Vi de Mi*, you will like even more her latest; *San Diego Vokas*. Alberta has entertained at Esperanto conventions in Europe, America and Japan. This album features "Yesterday" (trans. Jordan); "Bridge Over Troubled Water" (trans. Auld); "Volare" (trans. Minnaja); "I Love Paris" (trans. Docal-Lewin); "Send in the Clowns" (trans. diversaj); plus Polish, Spanish, Israeli, Hawaiian, Italian - ten other well-known songs. SPECIAL OFFER: LP record or cassette only \$9 from ELNA Book Service, while present stock lasts.

QUESTIONS MOST OFTEN ASKED ABOUT ESPERANTO and suggested answers - the 15-page compilation by David Wolff is proving useful for talks before service clubs, in helping interviewers formulate worthwhile questions, etc. It is available from David Wolff, 1622 Worcester Road #610-B, Framingham MA 01701 for \$1 postage paid.

INTERMOUNTAIN ESPERANTO CONFERENCE (EGI) October 5-7, 1984 in Colorado Springs. For details write Janet Brugos, Travel/Travel, 445 E. Cheyenne Mt. Blvd., Colorado Springs CO 80906.

TWO FUN-PACKED PROGRAMS IN DALLAS, Sept. 9 and Dec. 9, 2-4 PM at Holiday Inn, 1015 Elm, in room "Holiday 3." The program will feature sing-alongs with professional guitarist and an Esperanto contest with prize. The host is Michael Jones, "motoro" of the Dallas movement.

ESPERANTO FERIA ASOCIO DE BRITIO anoncas veturon al Esperanto-ferio centro en Bulgario 1-15 oktobro. London-Sofio-Pisanica, £285. Por detaloj, skribu al: EFA, Downham Reach, Nacton, Ipswich, England.

KIEVA ESPERANTO-KLUBO de internacia amikeco "Ora Pordego" volas montri al la publiko eblecojn kaj disvastiĝon de Esperanto. Volas kolekti afiŝojn kaj aliajn materialojn pri la temo "medio-protektado" por ekspozicio "NIA HEJMO – TERO" je jaro-fino. Krome ili kolektas afiŝojn pri kontraŭfuma kaj kontraŭalkohola temoj. Sendu al: Mihail Lineckij, p.k. 539/1, Kiev 200, USSR 252200.

ALVOKO AL KOMUNA LIBRO - *Antaŭ la Nova Jarmilo* - ideoj por la vivo en mondo minacata. Kompilos la libron D-ro W. Gunther kaj Helmut Welger, Bismarckstr. 28, D-3550 Marburg, F.R. Germanio. Ili bonvenigas ĉiajn kontribuojn - poemoj, eseoj, satiroj, k.s., pri pozitivaj aspektoj de homa vivo kun biografieto de la aŭtoro. Limdato 30a septembro 1986. Ĝi reflektu sintenojn el la Unua, Dua, kaj Tria Mondo.

KONSULTU LA KONSILANTON estas imitinda rubriko en la *Australian Esperantist*. Pensante, ke ELNA membroj profitus de simila servo, ni proponas la jenon: Se vi havas problemon pri Esperanto, Esperanto-aferoj, ktp, skribu al la Konsilanto. Se la demando entenas ĝeneralan intereson, ĝi kun la respondo aperos en *ELNA Newsletter* (sen nomo). Skribu al: Redakcio, 410 Darrell Road, Hillsborough CA 94010. La "konsilanto" restos anonima – fakte ne estos unuopulo, sed lertularo.

ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA – BOX 1129, EL CERRITO CA 94530

Enclosed is \$ _____ for new renewal membership in ELNA for the year 1984 1985.

Enclosed is \$ _____ as my tax-deductible donation to ELNA.

NAME _____

ADDRESS _____

CITY, STATE, ZIP _____

Check correct category: Regular (\$25) Family (\$37.50) Youth (18 or under:\$12.50)
 Student(full-time, 25 or under:\$12.50) Senior (65 or over:\$15.00) Sustaining(\$50) Life(\$500)

DATE OF BIRTH (if applying for Youth, Student, or Senior Membership) _____

TELEPHONE: [] _____ Radio Call Sign: _____

May we publish your telephone number in the *ELNA Membrolisto*? _____ May we publish your address? _____

LOCAL CLUBS EXCHANGING NEWSLETTERS:

CHICAGO: Esperanto Society of Chicago, Pres. Janet Bixby, P.O. Box 11958, Chicago IL 60611

FLORIDA: Esperanto Society of Florida, Pres. Debbie Green, 459 Harbor Dr. N., Indian Rocks Beach FL 33535.

FORT WORTH: Forth Worth Esperanto Group meets second sunday each month at home of John & Margaret Humphreys, 7944 Colfax, Fort Worth TX 76134.

INTERMOUNTAIN ESPERANTO GROUP: (AZ, CO, ID, MT, NM, UT, WY): Pres. Derek Roff, 1033 Indiana SE, Albuquerque NM 87108.

LOS ANGELES: Esperanto Association of Los Angeles, Pres. William W. Glenny, 430 Peck Dr., Beverly Hills CA 90212

MICHIGAN: Esperanto Society of Michigan, Sharon Lakosky, 2997 Mohawk Lane, Rochester MI 48063.

NEW ENGLAND: Esperanto Society of New England, Pres. David Wolff, 1622 Worcester Rd. 610-B, Framingham MA 01701.

OHIO: Esperanto Association of Central Ohio, Pres. John B. Massey, 1144 Kingsdale Terr., Columbus OH 43220.

PORTLAND: Esperanto Society of Portland (ESPO): Pres. Dr. John Schilke, 184 Harding Blvd., Oregon City OR 97045.

SACRAMENTO: Julie Dinnel, Editor, *Eta Glano*, 2450-28th St., Sacramento CA 95822.

SAN DIEGO: Esperanto Club of San Diego, Pres. Alberta Casey, PO Box 626, La Jolla CA 92038.

SAN FRANCISCO: San Francisco Regional Esperanto Organization (SFERO), Pres. Don Harlow, c/o ELNA, Box 1129, El Cerrito CA 94530. Meets 2 PM first Saturday each month (except July, August) at Main Library, San Francisco.

SEATTLE: Esperanto Society of Seattle, Pres. Wm. K. Bledsoe, 6002 NE 61st St. Seattle WA 98115.

Esperanto Institute, 17226 Palatine N., Seattle WA 98133.

UNITED NATIONS: U.N. Working Group, Betty Manson, 14 Stuyvesant Oval, New York NY 10009.

UTAH: Utah Esperanto-Klubo, c/o Heritage International, PO Box 2166, Salt Lake City UT 84110.

WASHINGTON DC: Washington Esperanto Society, Pres. John Dale, 1614 - 19th St. NW, Washington DC 20009.

NOTE: Information given is the latest received from the groups shown. All clubs and groups should IMMEDIATELY inform the Editor of any changes.

ELNA OFFICERS AND COMMISSIONERS

PRESIDENT:	Dr. Duncan Charters
VICE PRESIDENT:	Ken Thomson
SECRETARY:	Donald Harlow
TREASURER:	John B. Massey
Other Board Members:	Term Expires In:
Ellen Eddy	1985
David Richardson	1985
William H. Schulze	1985
Charles Power	1986
Virginia Stewart	1986
Chris Warnken	1986
Dr. James Cool	1987
William R. Harmon	1987
David Wolff	1987
Editor, <i>ELNA NEWSLETTER</i>	Catherine L. Schulze
Commissioner for Central Office	Wm. R. Harmon
Commissioner for Information	Ralph Murphy
Commissioner for Science/Tech.	R. Kent Jones
Commissioner for Tape Service	H. K. VerPloeg
Commissioner for Travel Affairs	Lucy Harmon
(c/o Esperanto Travel Service, 578 Grand Avenue, Oakland CA 94610 - [415] 836-1710)	
Commissioner for Wills & Gifting	John B. Massey
Commissioner for Women's Affairs	Cathy Schulze
Commissioner for Youth Affairs	Dr. James Cool
Co-Chairmen, UN Committee:	Dr. Julius Manson, Mark Starr
	Harold Dreyer

ELNA Archivist

Any member wishing to assist in the work of any of the above named commissions or committees should communicate with the member shown.

ELNA NEWSLETTER
 Volume 20, No. 4
 ISSN 0030-5065
 Esperanto League for North America, Inc.
 P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530
 Telephone: [415] 653-0998
 Editor: Catherine L. Schulze
 Graphics: William R. Harmon
 Photos: Doris Vallon-Wheeler
 Back issues available for promotional use.
 July-August 1984

Esperanto League for North America, Inc.

P.O. Box 1129
El Cerrito, CA 94530
Usono/USA

Nonprofit Organization
U.S. POSTAGE

PAID

Berkeley, CA
Permit No. 330

NEWS — PLEASE EXPEDITE

Address Correction Requested
Return Postage Guaranteed

Travel Tips for Esperantists from
ESPERANTO TRAVEL SERVICE
578 Grand Ave., Oakland CA 94610
[415] 836-1710

It's not too early to be thinking about plans for 1985! Here are some major Esperanto activities to plan for: **SAN FRANCISCO STATE UNIVERSITY** classes - July 1-19, 1985: 3 weeks of classes for all levels.

ELNA NATIONAL CONVENTION - July 20-25 at M.I.T. in Boston. After the convention, you can take the **ELNA CARAVAN TO THE U.K.** July 25-August 2, departing Boston or your own home town via New York to Berlin; then an excursion through East Germany and West Germany to Augsburg for the 70th World Conference.

UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO August 3-10 in Augsburg, Germany. This Bavarian city will be celebrating its 2000th birthday next year. This World Convention of Esperanto will be well-planned, exciting, and moderate in size. Afterward,

POST-UK EXCURSIONS THROUGH WEST GERMANY are being planned.

START THINKING NOW ABOUT 1986 (that's right, 1986!) - The World Convention will be in CHINA! Esperanto Travel Service has detailed planning already under way for three different itineraries for U.S. and Canadian Esperantists:

David Jordan - leading a standard tour for first-timers in China

Bill Harmon - leading a group on the Northern Route including Inner Mongolia, for repeaters in China
Lusi Harmon - leading an excursion to Southern China and Yangtze River Cruise.

AND AS FOR 1987, THE CENTENNIAL YEAR OF ESPERANTO, you may be sure that Esperanto Travel Service will have an outstanding caravan to Poland ready for U.S. and Canadian Esperantists!

(Hint - urge your Esperantist friends who aren't members to join ELNA right away so they won't miss out on forthcoming details of these great travel opportunities!)

IMPORTANT NOTICE:

Membership dues, book purchases, or donations to ELNA may be made by MasterCard or Visa.

BUT PLEASE NOTE that while ELNA accepts all dues, payments or donations to UEA as the U.S. Representative of UEA, NO payments to UEA may be accepted by credit card. When payments to UEA are made through ELNA, do NOT add the 6.5 guilder "check charge" imposed by UEA. If you are paying a UEA bill given in Dutch Guilders, compute the dollar equivalent at 35 U.S. cents per Guilder. Any credit for difference in exchange rate at time of payment will be refunded to you by ELNA. **Direktoro, ELNA CO**

HEROLDO DE ESPERANTO - Independent newspaper in Esperanto. 17 issues yearly; news, views, reviews, poetry, humor, calendar of events, science.

1984 Subscription Prices:

SURFACE MAIL 13.00
VIA AIRMAIL 16.00

NOTE: A free copy of *Heroldo* will be sent to anyone requesting it in Esperanto from: Heroldo, Calle de Jaun Ramon Jimenez 28, 6° A, Madrid 16, Spain.

ABONU AŬ REABONU

La Ĉinan Monatan Gazeton en Esperanto

EL POPOLA ĈINIO

Twelve thick issues a year via Airmail, each with three large color sections. EPĈ contains material about the People's Republic of China, the national Esperanto movement, and on the international Esperanto movement as well.

1 Year	\$6.00
2 Years	\$10.00
3 Years	\$14.00

El Popola Ĉinio is one of the most outstanding Esperanto publications in the world. Look it over and you'll agree!

Subscribe through your local agent:

ELNA CENTRAL OFFICE
BOX 1129
EL CERRITO, CA 94530